# SVISA ESPERANTO-SOCIETO
## INFORMAS

N-ro 5/1995 SEPTEMBRO-OKTOBRO


## SVISA ESPERANTO-SOCIETO
## ĜENERALA KUNVENO 1995

la 11-an de marto

en hotelo Steghof, Luzern

## PROTOKOLO

**Malfermo 10.15h**

Prezidanto: Perla Martinelli
Claude Gacond, vicprezidanto
Ernst von May, kasisto
Angelo Mellini, sekr.protokolanto

Ĉeestantoj: 17 kaj pli malfrue 19 personoj, el kiuj 18 membroj.

Perla Martinelli bonvenigas la membraron laŭ tagordo.

1) Tagprezidanto estas, laŭ proponoj, ŝi mem. Ŝi proponas Angelo Mellini kiel protokolanton kaj Aleŝ Bednark kiel voĉnombranton. La kunsido akceptas la du proponitojn.

2) Senkomente kaj unuanime oni aprobas la protokolon de la ĝenerala kunveno en 1994.

3-5) Komunikoj de la prezidanto. Morala kaj financa raportoj. La jarkalkulon kaj la buĝeton publikigis la kasisto en "SES INFORMAS". Senkulpiĝis David Bühlmann, Tazio Carlevaro, Verena Chaves-Walder, Margrit Guldin, Elisabeth Lauper, Lilly Schaerer, Giorgio Silfer.
Orientado pri la unua jaro de prezidanteco, kiu estis malfacila, sed sume pozitiva.

Kelkaj aferoj estas bone survoje.Nia planado moviĝas en la kadro de la tri-jara mandato. Speciale estas rimarkinda la seminario farita en la unua jaro de la prezidanteco.

Orientado pri la 3 novaj membroj de la Centra Komitato; Tazio Carlevaro (tiĉina regiono), Nicole Margot (romanda regiono), Angelo Mellini (alemana regiono).Bedaùrinde ni ne havas reprezentanton por la romanĉa Svislando. La Centra Komitato nun konsistas el Perla Martinelli, Claude Gacond, Ernst von May kaj la menciitaj tri personoj.

Orientado pri la perdo de la sekretario kaj danko al Ernst von May, kiu intertempe helpis.

Danko kaj aplaùdo al Fritz Liechti, kiu fervore redaktis SES INFORMAS.

Orientado pri la problemoj kun la agentejo ARGUS, kiu ne laboris tre bone kaj la necesa interveno.

Orientado pri la etaj retuŝoj de la statuto kaj pri la ŝanĝo de la adreso de SES. Por havi stabilecon, la nova adreso kaj jura sidejo estos ĉe CDELI/urba biblioteko de la Chaux-de-Fonds, kie estas la arkivo de SES. Tiamaniere ŝanĝo de prezidanteco ne kaùzos samtempe ankaù ŝanĝon de la jura sidejo.
Claude Gacond subtenas ĉi tiun sidejon klarigante, ke SES estas tipe ligita kun KCE kaj CDELI. La korespondadreso restos ĉe la prezidanto.
Oni ankaù deklaras, ke oni povus submeti la tekston de la statuto simple en la franca lingvo. En kazo de tradukproblemoj ĉiam valoras la franca versio.

Plue oni atentigas pri mankanta punkto en nia statuto: ni estas ligitaj kun UEA kaj

UEA estas ligita kun UNESKO. Do, ankaŭ ni rajtas havi reprezentanton ĉe UNESKO, nome la UNESKO-komisiono en ĝenevo.Necesas fiksi tiun punkton tute jure en nia statuto, por ke ni estu reprezentataj ĉe Unesko, kiam Unesko entreprenas ion en nia lando.

Orientado pri la studo de la unuigo de la 2 instancoj: SES-estraro kaj CK, kiu ideo vekis diversajn diskutojn, nome opiniojn de Nicole Margot kaj Fritz Liechti kaj la demandon de Sonja Brun pri para aŭ malpara nombro da membroj en tiu instanco.La kunveno aprobas la ideon havi nur la CK-on, kie estu reprezentataj ĉiuj tri lingvoregionoj (14 voĉoj por, 1 kontraŭ, 3 sindetenoj).

Venontjare la **ŝanĝo de la statuto** estos submetita al la ĝenerala kunveno.

La prezidantino emfazas, ke en la pasinta jaro oni sukcesis redukti la deficiton de 4750 frankoj al 618 frankoj.Krome ŝi insistis ĉe la kasisto, ke la buĝeto 1995 estu en egaleco; ĉio tio sen redukto de servo kaj sen altigo de la kotizoj. Ŝi vokas la "ĜK" aprobi la bilancon kaj la buĝeton.Post tiu alvoko leviĝas forta diskuto. - -En la buĝeto staras 3000 frankoj sub la globala titolo "informado, varbado". Sed laŭ interveno de Claude Gacond en tiu sumo estas entenataj 1500 frankoj por nova "gramatiko", kiun li volas eldoni. Kaj Franz Brügger indikas, ke en la 3000 frankoj ankaŭ estas 400 frankoj por la "tago ikso". Do ankoraŭ restas je dispono de la estraro nur Fr.1100. Se oni ne detalas tiujn sumojn la ĜK neniam scias, kiom da mono vere estas je dispono por varbadi kaj informadi. Jam aprobitajn servojn oni devas indiki en la buĝeto kiel rezervitajn sumojn por difinitaj taskoj.

La prezidantino volas konsideri la rimarkojn en la sino de la estraro. Oni konsentis altigi la buĝetitan sumon je 1500 frankoj kaj sekve la buĝeto indikas tiun sumon kiel perdon. Tamen altigo de la kotizoj ne estas en konsidero. La bilanco kaj la buĝeto (ŝanĝita) estas aprobitaj kun 15 voĉoj por kaj 3 voĉoj kontraŭ.
La prezidantino bedaŭras, ke nur malmultaj membroj de la lokaj grupoj estas samtempe membroj de SES kaj ŝi vokas la SES-anojn varbi pli da membroj por SES.
En la kampo de informado kaj publikaj rilatoj la seminario de Marco Picasso devus montri fruktojn. La lokaj grupoj devus ekvarbi laŭ la instruita metodo. D-ro Picasso, mende de SES, verkos taŭgan resumon.

SES, kiel la svisa societo por la informado pri la fenomena esperanto,kunlaboros kun KCE kaj kun LF-koop. SES intencas esti pli aktiva ene de UEA.

JES, la svisa junular-organizo ne plu ricevas mondonacon. Kiel la aliaj monpetantoj, JES ekde nun ankoraŭ havas rajton por mono, sed ĝi devas submeti al la estraro difinitajn agadplanojn antaŭ ol ricevi la monon.
JES ankaŭ devas esti pli bone prizorgita,nome la prezidanto almenaŭ devas ricevi regule SES INFORMAS kaj ankaŭ formalan inviton al la ĜK de SES. (La prezidantino de SES informos Tazio Carlevaro, kiu prizorgas la etikedojn.

Ernst Glättli laŭtlegas la kasrevizoran raporton kaj li atestas al la kasisto modelan laboron kaj proponas malŝarĝi lin.
La ĜK akceptas la malŝarĝon.

Ĉiuj pasintaj regionaj kunvenoj sukcesis.
Novaj datoj: Romandio 9/10-a de septembro 95, Tiĉino 10/11-a de februaro 1996, LCDF interlingvistika seminario 1/2-a de marto 1996.

6/7/8) Kiel nova sekretario estas akceptita unuanime Angelo Mellini.

Elektita kiel UEA-Komitatano por la jaroj 1995-1998 estas Elisabeth Lauper, kun 16 voĉoj por ŝi kaj 2 voĉoj por Holger Siebers.

La kunveno finiĝas je la 12-a kaj duono.

A. Mellini  Perla Martinelli

Protokolanto

oo0oo

**M O R T - A N O N C O**

La 23-an de junio 1995 mortis sinjorino

**ELISABETH HERRMANN**

La edzino de Hans Herrmann. Dum multaj jaroj ŝi estis membro de la Svisa Esperanto-Societo kaj de la Esperanto-Societo Bern.

Al ŝia edzo, nia ŝatata Hans Herrmann, ni esprimas la plej koran kondolencon kaj deziras al li multe da forto, elteni la doloriĝan disiĝon. Elisabeth restas ĉe ni ĉiuj en bona kaj amika rememoro.

Svisa Esperanto-Societo
kaj la redakcio de
SES INFORMAS

oo0oo

## INFORMEMULOJ SERĈATAJ!

La SES-komitato, 10.6.95, decidis revivigi la iaman trilingvan Esperanto-Information, sub alia nomo (provizore: LINGUA. *Informilo pri komunikada etiko*), kaj en alia grafika prezento. El ĝi aperis jam du prov-numeroj en la itala lingvo (haveblaj!). Gvidos la entreprenon Tazio Carlevaro, kiu petas la sinproponon de jenaj kunlaboremaj interesatoj:

a) Homoj, kun deziro kaj scio informi pri Esperanto, kaj pri ĉio, havanta rilatojn kun Esperanto kaj aliaj movadoj

b) Homoj, kapablaj redakti informon, taŭgigante ĝin al la publiko celata (cetere, tamen, T.C. pluredaktos unuecige la tuton), kapablaj korekte kaj bonstile uzi propran lingvon (serĉatas speciale romandoj kaj alemanoj), kapablaj legi la italan kaj esperanton (la informojn ĉiu redaktos en sia propra lingvo, pro tio estas necesa reciproka tutsvisa lego-kapablo!), kapablaj (sed tio *ne* estas esenca) cirkuligi PC-disketojn en Winword-2, kaj havantaj faksan adreson (tre utila por raciigi kaj rapidigi laboron).

c) La preso kaj la ekspedo de LINGUA okazos en Tiĉino, sed bedaŭrinde niaj ĵurnal-adresaroj estas ege malnovaj. Ni devas ĉion renovigi. Do serĉatas homoj, kiuj en ĉiuj svisaj Kantonoj indikos al ni al kiu periodaĵo (ĵurnalo, revuo), al kiu informmedio (radio-stacio, TV), al kiu oficiala instanco (grava asocio, Kantona Edukdepartemento, ks.) indus sendi la informilon. Sendu la indikojn kun preciza adreso! Dankegon.

d) Por la ekstera publiko, ni ekzistas kondiĉe, ke ni aŭdigas nian voĉon. Silento, aŭ nur porokaza letersendado al ĵurnaloj ne sufiĉas. Ni devas restarti nian informservon trilingvan.

Anoncu vin al

D-ro Tazio Carlevaro, Viale G. Motta 32, 6500 Bellinzona. Tf 092 25 29 88 (19:00); Faksa adreso 092 25 95 59.

Kun koraj dankoj kaj salutoj

Tazio Carlevaro

[signature]

# G R U P A J   I N F O R M O J

**ESPERANTO-SOCIETO BASEL:**

28.9.20.00h Monata kunveno en Altersheim Neubad, Holeestrasse 219.
S-ro Jan Niemann prelegos pri Greenlando.

26.10.20.00h Monata kunveno (loko kiel supre) Ni ludos skrablon.

**BELLINZONA:**

Ni kunvenas ĉiam la 2-an sabaton en Viale Motta 32
9.9.17.00h kaj 14.10.17.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**

En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
5.9.19.30 kaj 3.10.19.30h.

**ESPERANTORONDO BIELO:**

En restoracio AMI, Freiestrasse 8.
Ĉiun vendredon 18.00h-19.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" GENÈVE:**

En Institut National Genevois.
8.9.19.15h Monata unveno
13.10.19.15h Monata Kunveno

**ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:**

**MEMORIGO:**

Ne forgesu, ke je la 9-a kaj 10-a de septembro 1995 okazos la REGIONA SEMAJNFINO DE LA SVISA ESPERANTO-SOCIETO, en Cully, vinbera vilaĝo apud Lausanne. Rigardu la programon en SES INFORMAS n-ro 4/95.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:**

13.9.14.00-16.00h paroliga kunveno en Big Ben. Gvidos Franz Brügger.

28.9.20.00h en restoracio SIMPLON:
Raportoj pri la UK en Tampere.
Parolos: Rosa Mettler,Renata Filali, Margrit kaj Paul Scherer.

26.10.20.00h Kompilado de la LES-programo por la jaro 1996. Ĉiuj LES-anoj partoprenos.

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM
Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Druckerei Gysin Zürich. 6x im Jahr.
Red. Telefon 01/381 77 13

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ni kunvenas ĉiumonate iun vendredon, laŭ eb-leco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
En restoracio Schweizerhof, Bahnhofstrasse 18.
13.9.20.00h Monata Kunveno: Temo elektota de la prelegantino, Teresa Wadolowska el Polujo.
11.10.20.00h Monata kunveno: Ni legos LITERATURAN FOIRON. Gvidos Ernst von May.

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**
En Karl der Grosse, Kirchgasse 14.
11.9.1915h Monata Kunveno: Dieter Rooke prelegos pri la Esperantomovado en Kanado.
9.10.1915h Monata Kunveno: Programo: Lingvaj ludoj kun Dietrich Weidmann.

oo0oo

**Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 6/95 estas la 7-a de oktobro 1995.**